

XIV ORDINARA TEMPO – 6an de julio 2014

MI ESTAS MILDA KAJ KORHUMILA – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 11,25-30

En tiu tempo Jesuo preĝis, dirante:

“Mi gloras Vin, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ke Vion tion kaŝis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkaŝis al simpluloj. Jes, Patro, ĉar tiel plaĉis al vi. Mia Patro transdonis ĉion al Mi. Neniu konas la Filon escepte de la Patro. Kaj neniu konas la Patron escepte de la Filo kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin. Venu al Mi ĉiuj, kiuj estas lacigitaj kaj ŝarĝitaj, kaj Mi ripozigos vin. Metu sur vin mian jugon kaj lernu de Mi, ĉar Mi estas milda kaj korhumila, kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila kaj mia ŝarĝo malpeza”.

Post la plendo de Jesuo pri la urboj de Galileo kiuj rifuzis la mesaĝon de la Regno, kaj ili ĝin rifuzis ĉar ili estas regataj de la sinagogo, de la instruado de la skribistoj kaj de la fariseoj, Jesuo benas male tiujn kiuj ĝin akceptis. Mateo ĉapitro 11, versiklo 25.

“En tiu tempo”, do la evangeliisto ligas tion kion li nun prezentas kun tio kiu antaŭas la plendon de Jesuo, “Jesuo diris: ‘Mi laŭdas vin Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ĉar vi kaŝis tiujn aferojn for de saĝuloj kaj prudentuloj kaj ilin malkaŝis al simpluloj’”.

Ni tuj klarigu ke Jesuo ne prenas starpunkton kontraŭ la saĝo, kontraŭ la klereco, absolute ne. La saĝuloj kaj la prudentuloj estas la majstroj pri la leĝo, la oficiala instruistaro de Israelo, tiuj kiuj jam kondamnis Jesuon kiel

blasfemanton. Kial Jesuo diras ke la Patro al ili kaŝis tiujn aferojn? Ĉar la amo-Dio estas kaŝita al la leĝo-fakuloj.

Kiu kutimas sin rilatigi al la situacioj, al la okazaĵoj, al la personoj, surbaze de iu kodo, surbaze de iu leĝo, ne povas kompreni la vizaĝon de iu Dio kiu estas amo, iu Dio kiu kreas la homon kaj amas kaj defendas sian kreitaĵon. Do la kriterio de interpretado de la skribo, de la Biblio kaj de la vorto de Dio, devas esti la bono de la homo. Kiu male faras el ĝi doktrinon, leĝon, en kiu la respekto de la ordonoj, de la preceptoj, estas pli grava ol la bono de la homo, nu tiuj personoj riskas havi antaŭ la okuloj iaspecan vualon, kiu malebligas al ili malkovri la amoplanon de Dio pri la homaro.

“Kaj ilin vi malkaŝis al la simpluloj”. La vorto celas ne la malgrandulojn sed ĝuste la simplulojn, nome la personojn kiuj ne havas malfacilaĵojn akcepti iun amo-Dion ĉar tion ili bezonas. *“Jes, Patro, ĉar tiel vi decidis per via bonvolemo”.* Dio do decidis ke la kriterio por lin koni estas la amo, ne la leĝo, ne la doktrino.

“Mia Patro transdonis ĉion al Mi. Neniu konas la Filon escepte de la Patro. Kaj neniu konas la Patron escepte de la Filo kaj tiu, al kiu la Filo volas malkaŝi Lin”. Kion volas diri Jesuo per ĉi tiu tiom grava dirmaniero? Jesuo estis prezentata de la evangeliisto ekde la komenco de lia evangelio kiel la “Dio kun ni”, iu Dio kiun oni ne devas serĉadi, sed akceptadi.

Kaj, akceptante tiun ĉi Dion, iradi kun li kaj kiel li, ne direkte al Dio sed direkte al la homoj. Do per Jesuo Dio iĝis homo, kaj tio estas la ununura sankta valoro, la ununura grava valoro, la ununura celpunkto en la vivo de la kredanto. Kaj kial Jesuo diras ke neniu konas la Patron escepte de la Filo kaj de tiu al kiu la Filo volas ĝin malkaŝi? La verbo ‘malkaŝi’ signifas forpreni tion kio malhelpas vidi, tio estas la leĝo. La leĝo malebligis koni la amon de la Patro.

Kaj male la kriterio por akcepti Jesuon kaj por kompreni la Patron estas meti en sian vivon kiel ununuran absolutan valoron, kiel ununuran sanktan valoron, la bonon de la homo. Kaj tion dirinte Jesuo, post distanciĝo de tiuj saĝuloj, de tiuj kleruloj, kiuj igas la leĝon soklo por regi la popolon, Jesuo sin adresas ĝuste al tiuj kiuj estas regataj, la subprematoj.

Kaj ĝi estas invito de ia nekredebla forto kaj tenero. *“Venu al Mi ĉiuj”*, Jesuo invitas ĉiujn, *“kiuj estas lacigitaj kaj ŝarĝitaj”*. Lacigitaj kaj ŝarĝitaj pro kiu kialo? Pro la ŝarĝo de la leĝo, ĉar ili ne sukcesas respekti ĉiujn tiujn

regulojn, ĉiujn tiujn doktrinojn, ĉiujn tiujn trudordonojn. Estas tio kio lacigas ilin, subpremas ilin, ĉar la respekto de ĉiuj tiuj reguloj, kiujn ili ne sukcesas praktiki, igas ilin sin senti kulpaj, ĉiam ŝuldantaj al la Sinjoro.

Kaj jen la anonco de Jesuo: "*Mi ripozigos vin*". La verbo utiligata de la evangeliisto "prizorgi" signifas "ripozigi, ĉesigi la lacon", tio estas rekapti la spiron. Estas Jesuo kiu diras: "Mi estos via spiro". Do tiuj kiuj estas subpremataj pro iu rilato kun Dio kiun ili ne sukcesas daŭrigi pro la troaj leĝoj kaj reguloj, Jesuo diras "akceptu min, mi estos via spiro. Mi estos tiu kiu donos al vi spiron".

Kaj fakte Jesuo daŭrigas: "*Metu sur vin mian jugon*". La jugo, ni tion scias, estas ilo kiun oni metadis sur la bestoj por ilin regi en la laboro. Nu, la observado de la dia leĝo estis vokata "jugo". Ĝi estis ne observebla leĝo. Ankaŭ Petro en la Agoj de la Apostoloj, kiam oni volas trudi tiujn leĝojn al la paganoj, Petro diras: "*Kial vi daŭre tentadas Dion volante sur la kolo de la disĉiploj jugon kiun nek niaj patroj nek ni estis en la kondiĉo porti?*"

Do ĝi estas fiasko. Tiu doktrino, tiu trudado estis fiasko, ĉar neniu sukcesis ilin sekvi kaj tio ĉiam igis la homon sin senti kulpa, ŝulda al Dio. Kaj kiam oni sin sentas kulpaj, ne eblas eksperimenti lian amon.

Tiam Jesuo diras: "*Metu sur vin mian jugon kaj lernu de Mi, ĉar Mi estas milda kaj korhumila*". Jesuo ĉi tie ne estas diranta imiti la kvalitojn de lia karaktero - ne eblas havi la karakteron kaj la kvalitojn de Jesuo. La mildeco kaj la korhumileco de Jesuo ne rilatas al la karaktero, al la kvalito de iu persono, sed al la socia kondiĉo.

En la beateco "beataj la mildaj", tiuj estis la mizeruloj, la lastaj en la socio, la humilaj, greke tapinos, estas tiuj kiuj estas sensignifaj. Jesuo faris elekton: li metis sin flanke de la lastaj, de la nevideblaj, de la sensigifaj personoj. Do tion eblas fari. Kaj kion tio signifas? Ne forigu iun ajn de la agradiuso de via amo.

Ne serĉu la gravulojn, tiujn kiuj estas en la unuaj lokoj, sed metu vin flanke de la lastaj, ĉar tie mi estas. Do "*lernu de Mi, ĉar Mi estas milda kaj korhumila, kaj vi trovos ripozon por viaj animoj*". Jesuo do invitas nin direkti nian vivon je la servo de la aliaj kaj en tio estas la spiro, tiu kiu donas kuraĝon kaj forton al la ekzistado de la kredanto.

Kaj Jesuo konkludas ripetante la inviton. "*Mia jugo*" ne la jugo de la leĝo do, sed lia jugo, kaj la jugo de Jesuo estas la beatecoj, tio estas invito al ĉio kio kontribuas al la plena feliĉo de la homo. "*Ĉar mia jugo estas facila*"

laŭlitere "bona", "*kaj mia ŝarĝo malpeza*". Kaj ĝi estas malpeza, ĉar ne estas reguloj observendaj, sed amo akceptinda.

Ne iu doktrino akceptenda en propra ekzistado, sed iu Jesuo kiu petas esti akceptata por fandiĝi kun la homo, al li donante sian saman amkapablon.